

Bulgara **ESPERANTISTO**



Nano Kjuĉukov. Triumfo de la leninisma nacia politiko . . .	1
Ĥristo Smirnenski. Moskvo. Tradukis Asen Grigorov . . .	3
Asen Grigorov. Kun vi ni festas	3
Nikola Aleksiev. Gaste en Uzbekistano	4
Teodoro Kulagin. Vizito de karaj gastoj	6
A. Ĥarkovskij. Junulara tendaro apud Moskvo	6
Juzefine Baliene. Nia regula BET	
Teodoro Kulagin. La lingvo de internacia interkomunikado en la nuna tempo	8
A. K. Esperanto-kursoj en Ĥarkov	8
Johannes Palu. Esperanto-novaĵoj el Estonio	9
Rudi Graetz. Georgi Dimitrov estas ankaŭ nia heroo . . .	9
Vasja Petrova. Neforgesebla cerebro de l'artisto-esperantisto Anani Anev	10
Kunĉo Vâlev. Salutparolado al la artisto Anani Anev . . .	10
Cvjatko Todorov. Interdistrikta renkontiĝo honore al la 50-a jubileo de USSR	11
* * * Grava sukceso	12
Fani Miĥajlova. E-kursoj en Plovdiv-distrikto	12
Kiril Draĵev. Dana esperantisto en Bulgario	12
Georgi Dolapĉiev. (Fragmento de eldiro antaŭ la 38-a Kon- greso de BEA)	13
Ĥristo Manolov. (Fragmento de eldiro antaŭ la 38-a Kon- greso de BEA)	13
Hilda Dresen. Dimitr Zlatarski — Miti	14
* * * Nova intereso pri la Internacia Lingvo en Kolombio .	15
Alfred Müller. (Fragmento el letero)	15
Aleksandro Péter. Renkontiĝo de denaskaj esperantistoj . .	16
Tinka Lakova. „Kun onklo Ho“	16
Milica Sokolova. (Nekrologo pri V. I. Vereŝĉagina)	III
* * * Deziras korespondi	III

Sur la kovrilpaĝo:

Parto de la partoprenintoj en la interdistrikta renkontiĝo en
Ŝumen honore al la 50-a jubileo de USSR (vidu paĝon 11)

*Abonkotizo : iara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 4,28 lv., 5 rubloj, 2,50 dola-
roj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Ru-
manio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta nu-
mero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifo : 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-
anoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — vutlikigataj senpage.*

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco
Nullo 2, Padova.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205,
Bukureŝti 1.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Mos-
kva V—449.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.



TRIUMFO DE LA LENINISMA NACIA POLITIKO

La kreo de la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj antaŭ 50 jaroj estis rimarkinda evento en la tutmonda historio kun kolosaj postsekvaj por la soveta popolo kaj por la tuta homaro. Ĝi estas triumfo de la vivpotenco de l'marksismo-leninismo pri la nacia problemo, triumfo de la ideoj de frateco kaj amikeco inter la popoloj, triumfo de la proleta internaciismo.

La kreo de USSR estiĝis ebla dank' al la venko de la Granda Oktobra Socialista Revolucio, kiu kreis la necesajn politikajn premisojn por ĝusta solvo de la nacia problemo, forigis la ekspluatatan kapitalisman sociordon kaj metis la fundamenton de neretenebla transiro de kapitalismo al socialismo en tutmonda skalo.

La ideo pri kreo de USSR kiel libervola unuiĝo de egalrajtaj popoloj sub la gvido de la Komunista Partio de Sovetunio sukcesis unuigi la klopodojn de la laboruloj el ĉiuj nacioj en la unua socialisma ŝtato. Sur la senlima teritorio de la soveta lando firmiĝis nova sociordo, novaj rilatoj inter la homoj, liberaĵ de ekonomia kaj spirita premo kaj ekspluato. Realigis la plej intimaj multjaraj revoj de la homo — konstrui mondon, kie ne ekzistos ekspluato kaj nacia subpremo, kie la homoj vivos kiel fratoj en paco kaj laboro.

La intima unueco de ĉiuj nacioj kaj popoloj en la soveta ŝtato organe devenas de la karaktero mem de la soveta sociordo. La socialisma demokratio efektive garantias nacian egalecon, politikan, ekonomian kaj kulturan floradon de la laboruloj de ĉiuj nacioj.

En batalfrateco dum la Granda Patrolanda Milito (1941—1945) reprezentantoj de pli ol 100 nacioj en unueca familio defendis sian patrolandon. La venko de la soveta popolo metis finon ne nur al hitlerista Germanio, sed ankaŭ al la faŝismo kiel rasisma teorio, kaj konfirmis ankoraŭ foje la vivpovon de la frata unueco, amikeco kaj internacia solidareco.

Hodiaŭ la Unio de la Sovetaj Socialistaj Respublikoj estas potenca lando kun alte evoluinta industrio kaj mekanikigita agrikulturo, kun rimarkinda vivnivelo de ĉiuj tavoloj de la loĝantaro. Ĝi atingis senprecedencan disvolviĝon de la kulturo, socialisma laŭ enhavo kaj nacia laŭ formo. Popoloj kaj nacioj, kiuj eĉ ne havis propran alfabeton, nun posedas potencon industrion, scienc-teknikan inteligentularon, universitatojn kaj akademiojn.

Unu el la plej gravaj rezultoj de la kuna batalo de la laboruloj de USSR por la konstruado de socialismo kaj komunismo estas la formiĝo de la soveta popolo kiel nova historia komunaro de homoj.

En la batalo por kreo de unueca socialisma ekonomio kaj kulturo naskiĝas kaj evoluas la objektiva neceseco de komuna lingvo por internacia

komunikado kaj kunlaboro. Por tia lingvo ĉiuj nacioj kaj popoloj de USSR elektis libervole la rusan lingvon. Ĝi transformiĝis en potencon ilon por reciprokaj ligoj kaj unuiĝo de la sovetaj popoloj en la kadro de la komuna ŝtato — USSR.

La kreo de USSR havas netakseble grandan signifon por ĉiuj popoloj, por la tutmonda revolucia procedo. La spertoj de USSR instruas, kiel oni devas kaj povas solvi la nacian problemon kaj laŭ tiu maniero forigi ĉian mallecalecon kaj subpremon, ŝovinismon kaj rasismon.

Per siaj historiaj venkoj en la Dua Mondmilito Sovetunio ludis decidan rolon por la venko de la socialista revolucio en vico da landoj en Eŭropo kaj Azio. Sur la principoj de la socialisma internaciismo inter la landoj de la socialisma komunaĵo formiĝis nova tipo de internaciaj rilatoj. Konstruitaj sur unutipa soci-ekonomia kaj politika fundamento, sur unueca ideologio, inspirataj de la principoj de plena egaleco kaj respekto al la suvereneco, ĉiuj ĉi interrilatoj estas modelo de egalrajteco, kian la historio ĝis nun ne konas.

Ĉefa apogo de la socialisma mondsistemo kaj de la tuta internacia liberiga movado estas la granda Lando de la Sovetoj. „Se la homaro ne brulas en la flamoj de nova mondmilito, — emfazas k-do Todor Ĵivkov, unua sekretario de CK de Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario, — se la imperiismo ne povas krude trudi sian volon al la novliberigitaj landoj, se la socialismaj landoj sukcese konstruas sian novan vivon — tion oni ŝuldas al Sovetunio, al la ruĝa giganto, staranta sur unu sesono de la terglobo, forta, pacama, frate malavara kaj preta veni helpe al ĉiu popolo, kiu batalas por sia libereco kaj sendependeco, por homa vivo“.

Por ni la amikeco inter la popoloj de Bulgario kaj Sovetunio estas necesaj kiel suno kaj aero por ĉiu viva estaĵo. Ĝi transformiĝis en unu el la movanlutaĵoj fortoj de la socialisma disvolviĝo de nia lando. Per la frata helpo de Sovetunio PR Bulgario transformiĝis el ege postrestinta agrara lando en evolucionantan industriagran socialisman ŝtaton. Per sovetaj helpo ĉe ni estas konstruitaj ĉirkaŭ 200 plej grandaj kaj modernaj entreprenoj. Grandega estas la sovetaj helpo ankaŭ nun, dum la jaroj de la Sesaj Jarkvino, kiam la bulgara popolo konstruas maturan socialisman socion.

La idealoj de paco kaj amikeco inter la popoloj estas grandaj idealoj ankaŭ de la esperantistoj, kiu batalas por ilia triumfo. Tial ni, bulgaraj esperantistoj, salutas varme la pacaman politikon de Sovetunio, kiu respondas al la interesoj de la tuta homaro. Pleje ni subtenas la principon de paca kunekzistado inter la ŝtatoj kun malsama sociordo.

La bulgaraj esperantistoj subtenas kontaktojn de plej sincera amikeco kaj solidareco kun siaj sovetaj fratoj-esperantistoj. Ili ĉiam aklamis kaj aklamas la sukcesojn de USSR. Internaciistoj laŭ animo kaj koro, ili vidas en ĝi efektivigon de la principoj, en kies nomo estis vokita al vivo la tutmonda esperantista movado. La bulgaraj esperantistoj man-en-mane kun la sovetaj esperantistoj firmigas sian solidarecon kaj disvolvas la nerompeblan amikecon inter siaj popoloj.

Salutante la sovetajn esperantistojn lige kun la glora kvindekjara jubileo de la multnacia sovetaj socialisma ŝtato, la bulgara esperantistaro deziras al ili novajn, ankoraŭ pli grandajn sukcesojn en la konstruado de la komunismo — la hela estonteco de la tuta homaro.



Poezio kaj beletrio

MOSKVO

de Hristo Smirnenski

Ho Moskvo, Moskvo!
Vi arde ree pulsas, ree flagras!
Vi ree estas koro flama
kaj kun ridet' purpura gardostaras
ĉe Pfrate kunpremitaj manoj.
Ĉar brilo via de aŭror'
la mondmallumon jam traboris,
ĉar vi kiel fratina kor',
la ĝojon helan kaj angoron
entenas de la tuta ter'!
Ho Moskvo, Moskvo! —
vi koro el fandita fer'!

Ho Moskvo, Moskvo!
vi venkis ĉe l'granita pord'
la hordojn de la kontraŭulo;
kaj vibras via stel' rubena for
al ĉiu sklava terangulo,
la sklavo kie plugas en amaro
kaj mortas sen pecet' da pan',
kaj kie tondre la proleta maro
ekbolis de la sanga flam'
de la milita fajr' kruela.
Ho Moskvo, Moskvo! —
de novaj tempoj stelo hela!

Ho Moskvo, Moskvo!
El viaj placoj vi hodiaŭ diras
verdikton de la prem' centjara.
Vin Rom', London', Pariz', Berlin' admiras,
en vi nun estas tuta proletaro.
Fieras vi en via bru' kaj brulo
kun la sopir' pri Plasta lukto,
per ĉiu via viro kaj junulo
trumpetas vi tra l'mondo tuta
kaj rompas la sklavekatenojn! . . .
Ho Moskvo, Moskvo! —
vulkan' el koroj ardoplenaj!

1921 El la bulgara: Asen Grigorov

KUN VI NI FESTAS

de Asen Grigorov

Kun vi ni festas nun,
Sovet-Unio,
kun vi ni ĝojas,
kantas
kaj jubilas,
ĉar kvindek jarojn frata harmonio
kaj suno sur ĉielo via brilas!
Ĉar venkis vi sentime multajn barojn,
malsatis vi
kaj luktis vi survoje
kaj vi plenumis viajn glorajn farojn,
ĉar iris vi

antaŭen —

sen hezit',

heroe!

Ĉar nun vi gardostaras sen ŝancelo,
rebatas brave la militminacon,
kuraĝe iras al la fina celo —
al komunismo,
al tutmonda paco!

En via lando

vasta

kaj amika

de Murmansk mem

ĝis Nigra Maro,

de pola lim' —

ĝis bordo pacifika

laboras pace frata popolaro.

Konkorde iras ruso kaj uzbeko
al sama celo,

sama idealo,

kaj festas en la glora jarkvindeko
estono

kaj kazaĥo

kaj tataro.

Kun vi, ho unuigo multnacia,
vi —

nevenkebla,

vi —

nedeŭrebla,

fidela,

justa

kaj revolucia —

kun vi ni festas en ĉi hor' celebra!



GASTE EN UZBEKISTANO

(Daŭrigo el n-ro 11)

En la ĉefurbo Taŝkent estas ankoraŭ multaj imponaj sociaj konstruaĵoj (Domo de la Supera Soveto kaj la Registaro, Akademia Grandteatro por Opero kaj Baletoj „Aliŝer Navoi“, Dramteatro „Hamza“, Palaco de la Artoj k. a.). Ili estas trafa kunigo de nuntempa konstruado kun karakterizaj elementoj de la uzbeka nacia arkitekturo.

Stile originala konstruaĵo estas la Muzeo de Lenin, situanta preksime de la registara centro. Ĝi de la unua rigardo kaptas la atenton de la vizitanto. En la vastaj ejoj de la Muzeo la granda faro de Lenin estas montrita en intima ligo kun liaj pli specialaj zorgoj pri la popoloj de Turkeŝtano, kies parto estis tiutempe ankaŭ Uzbekistano. Per speciala dekreto, subskribita de Lenin, en Taŝkent jam en 1920 jaro estas fondita la unua en tuta Mez-Azio universitato de la popoloj de Turkeŝtano. La Muzeo estas tre interesa kaj altiras multajn vizitantojn kiel el eksterlando, tiel same el la lando.

Ni eniris la novan konstruaĵon de la Prezidentaro de la Supera Soveto de Uzbeka Soveta Socialista Respubliko. Renkontis nin mezaĝa virino kun modesta kaj respektiga eksteriĝo. K-dino H. M. Pulatova estas sekretario de la Prezidentaro de la Supera Soveto. Ŝi volonte rakontis al ni pri la organizo de la ŝtata vivo en la Respubliko, pri la ligoj de la ŝtatorganoj kun la vastaj popolamasoj, pri la disvolviĝo de la socialisma demokratiismo. K-dino Pulatova substrekiis, ke triono el la deputitoj de la Supera Soveto estas virinoj, kaj montris la ĝustajn ciferojn.

El la lando kun nedisvolvita industrio kaj malforta vilaĝmastrumo, diris ŝi, dum la jaroj de la soveta potenco Uzbekistano transformiĝis en industrian ŝtaton kun mekanikigita alte evoluinta vilaĝmastrumo. Bone disvolviĝis la maŝinkonstruado kun speciala atento pri la agrikultura maŝinkonstruado pro la karaktero de la lando. La Respubliko disponas pri nigra kaj kolora metalurgio, moderna kemia kaj elektroindustrio. Ĝi posedas grandajn teks-entreprenejojn (unu el ili estas la plej granda en tuta Sovetunio), koton-sengrajnigajn uzinojn. Dum la lastaj jaroj en Uzbekistano estas malkovrita la plej granda en USSR kuŝejo de naturgaso — pli ol tri trilionoj da kubmetroj. La Respubliko havigas naturgason al Moskvo kaj Uralo, nun oni preparas la sendadon de gaso ankaŭ al la baltaj respublikoj.

En la vilaĝmastrumo ĉefa branĉo estas la otonproduktado — „la blanka oro“ de la Respubliko, ĝia gloro kaj fiero. Pasintjare oni produktis 4,5 milionojn da tunoj da kruda ko-

tono, ĉi-jare oni atendas pli. Uzbekistano donas 65% el la tuta kotonproduktado de USSR. Laŭ amplekso ĝi okupas la duan lokon post Usono, kaj pokape de la loĝantaro — la unuan lokon en la mondo.

La naturo kaj la klimato de Uzbekistano favoras la disvolviĝon de ĉiuj branĉoj de la vilaĝmastrumo. En la fako de la ŝafbredado estas vaste disvolvita la produktado de la tutmonde famaj astrakan-peltoj — pli ol 40% el la tuta produktado de tiu ĉi artiklo en USSR. En tutmonda skalo Sovetunio estas la plej granda liveranto (51%) de tiu ĉi eksterordinare serĉata luksa varo, por kiu ekzistas nelimigita merkato.

Ĉe nia vizito en la Sciencesplora Instituto de Bredado de Astrakanŝafoj en urbo Samarkand ni havis la plezuron ĝui dekojn da astrakan-peltoj kun plej diversaj koloroj kaj nuancoj: de la nigraj, kiuj estas plej serĉataj (40 rublojn unu — laŭ ŝtatprezoj), ĝis la selektitaj apenaŭ nur antaŭ kelkaj jaroj tute blankaj, taŭgaj por tinkturado en diversaj koloroj. Speciale emociita estis la virinparto de nia grupo — ĝi ne povis deŝiri la rigardon de tiu ĉi tenta vidaĵo. . .

La Samarkand-Instituto estas fondita en 1935 jaro kaj estas tutmonde konata. Ĝia direktoro Ŝarafudinov konigis al ni la problemojn, super kiuj laboras sufiĉe granda kolektivo de cent sciencaj laboristoj (el ili 40 kandidatoj de la sciencoj kaj tri doktoroj). Dekunu sovhozoj kaj 60 kolhozoj en la Respubliko specialiĝis pri produktado de astrakan-peltoj.

Agrabla estis ankaŭ nia vizito en la Sciencesplora Instituto de vit- kaj frukto-kulturado „Akad. Schroeder“ (Ŝrjoder) en Samarkand. Nia renkontiĝo kun grupo de sciencaj laboristoj komenciĝis ĉirkaŭ tabloj, supersarĝitaj per bongustaj fruktoj. Ni eksciis, ke antaŭ kelkaj jaroj la registaro disponigis al la Instituto nekulturitan terenon de 8000 dekaroj, por krei sur ĝi eksperimentan mastrumon de fruktokulturado. Laŭ la uzbeka proverbo „Kie finiĝas la akvo, tie finiĝas ankaŭ la tero“, la Instituto komence devis sekurigi regulan kaj abundan akvumon pere de tuta reto da kanaloj. Irante sur la teritorio de la mastrumo, ni ne povis kredi al niaj okuloj, ke tio estas eksa dezerto: sur ĝi ĉio kreskis bonege kaj donis abundajn fruktojn.

En la Instituto aktivas 26 sciencaj laboristoj, la duono el kiuj estas kandidatoj de la sciencoj kaj unu bezonis „ankoraŭ kvin minutojn“ por esti doktoro de la sciencoj, kiel ŝerce diris la direktoro de la Instituto Ĝu-naev. Ili laboras super pli ol mil specoj de vin-



beroj kaj fruktarbetoj (vitoj — 140 specoj, Pomoj — 170, persikoj — 182, abrikotoj — 181, piroj — 86 ktp). Uzbekistano specialigis pri la produktado de sekigitaj vinberoj kaj fruktoj. Nur Samarkand donas 90% el la tuta produktaĵo de sekigitaj vinberoj en Sovetunio.

La Instituto havas ligojn kun parencaj scienc-institucioj en eksterlando, ankaŭ kun la niaj. Kelkaj specoj de uzbekistanaj vinberoj estas transportitaj en Bulgarijon.

Reveninte el Samarkand en Taŝkent, ni renkontiĝis kun la ministro de la instruado Ŝermuhamedov kaj aliaj gvidantoj el la Ministerio. Ili konigis al ni la disvolviĝon kaj la nunan staton de la popola instruado en la Respubliko.

Antaŭ la Oktobra Revolucio nur 2% el la loĝantaro de Uzbekistano scipovis pli-malpli legi kaj skribi. Hodiaŭ la tuta loĝantaro estas instruita. La instruado en la elementaj lernejoj estas farata en kelkaj lingvoj depende de tio, kiu nacieco dominas en la koncerna regiono: uzbeka, taĝika, kirgiza, turkmena, karakalpaka k. a. La rusan kaj la uzbekan lingvojn oni lernas en ĉiuj lernejoj, ĉar ili estas libervole elektitaj kiel rimedo por internacia kompreniĝado kaj komunikado en la limoj de la Respubliko (80% uzbekoj) kaj de la tuta Unio (kie vivas pli ol 130 egalrajtaj nacioj kaj naciecoj). Oni lernas laŭplaĉe ankaŭ iun okcidenteŭropan lingvon aŭ hindi (la plej disvastigita lingvo en Hindujo).

Oni vaste aplikas senpagan havigon de lernolibroj por la lernantoj. Disponigataj estas la necesaj monrimedoj por kreo de moderna materiala-teknika instrubazo, ekipado de kabinetoj por la diversaj instruobjektoj ktp. por respondi pli bone al la postuloj de la nuntempa scienca-teknika revolucio. Pligrandiĝis ankaŭ la produktado de televidaj instrufilmoj.

Parto de la gastoj renkontiĝis kun la ministro de la justeco kaj la ministro de la sanprotekto. Ĉie oni donis al ili plenan eblecon starigi demandojn, al kiuj ili ricevis kompetentajn respondojn. La gastoj restis tre kontentaj pro la senĝena amika atmosfero, kiu ĉirkaŭis ilin ĉie, ĉe ĉiuj renkontiĝoj.

En Uzbekistano troviĝas iuj el la plej interesaj monumentoj de l'antikva orienta arkitekturo. La uzbeka popolo gardas zorgeme tiujn trezorojn de sia multjarcenta kulturo.

Prave Samarkand estas konsiderata kiel lulilo de la scienco kaj kulturo de l'uzbeka popolo. Ĝi ekzistas pli ol 2500 jarojn. Marŝante tra ĝiaj stratoj kaj ĝuante la belegajn arkitekturajn ensemblojn, vi havas la impreson, ke vi foliumas plej interesajn paĝojn el la historio de tiu fama urbo, samtempulo de Babilono, Ateno kaj Romo, ligita kun la nomoj de gloriaj scienculoj, verkistoj, arkitektoj, pentristoj. La imponaj arkitekturaj monumentoj de Buhara kaj Samarkand, kiujn ni povis vidi, lasis

ĉe ni neforviŝeblajn postsignojn. La soveta potenco ekskluzive zorgas pri la konservo kaj restarigo de tiu ĉi multvalora heredaĵo.

Al la antikva gloro de tiuj urboj la soveta epoko aldonis novan gloron, starigante nuntempajn kulturmonumentojn: universitatoj, bibliotekoj, konservatorioj, teatroj, operejoj, baletejoj, kinostudioj. . .

En Taŝkent ni spektis la nacian baleton „Tanaŭar“, kiu plastike kaj brile pentras la batalon de la novo, alportita de la soveta potenco dum la fruaj jaroj de ĝia kreiĝo, kontraŭ la restaĵoj de la forpasinta vivmaniero, forigataj malfacile kaj provokantaj sangajn dramojn.

Dum la gazetara konferenco kun la taŝkentaj ĵurnalistoj kaj korespondantoj de la centraj informiloj oni starigis al ni diversajn demandojn. Oni interesiĝis pri la iniciatoj, kiuj estas efektivigataj en PR Bulgario dediĉe al la 50-jariĝo de USSR. Mi rakontis koncize pri la plej gravaj el ili kaj substrekis, ke la bulgara popolo preparas sin celebri tiun ĉi eminentan datrevenon kiel sian propran feston.

En mitingo kun la civitanaro ni estis salutitaj de Sukurova — prezidantino de la Societo por Amikeco kun Eksterlando, de Jakobĝanova — vicprezidantino de la Ĉefurba Popola Soveto, de Nuriddinov — rektoro de la Pedagogia Instituto, kaj de Kajumov — ĉefredaktoro de ĵ. „Uzbekistana Kulturo“. El nia grupo parolis reprezentantoj de Uganda, Hindujo, Pakistano, Siera Leone kaj PR Bulgario. Dum mitingo estis esprimita la estimo, kun kiu la popolo de Uzbekistano renkontis siajn gastojn.

Multaj uzbekoj vizitas alilandojn. Mi renkontiĝis kun viroj kaj virinoj, kiuj estis venintaj en Bulgarijon kaj parolis kun entuziasmo pri la naturo kaj la homoj de nia lando.

Tre agrable estis por mi vidi la elstaran sovetan esperantiston Petro Poliŝĉuk, prezidanto de la Esperanto-komisiono por Ligoj kun Eksterlando ĉe la Uzbeka Societo por Amikeco kaj Kulturligoj kun Eksterlando. Ni brakumis nin kiel sangfratoj, partoprenis la gazetaran konferencon en la Domo de l'Amikeco en Taŝkent, ĉeestis kune la kunvenon-renkontiĝon kun la civitanoj de Taŝkent, pasis kune tra la plej belaj bulvaroj de tiu ĉi kvara laŭ loĝantaro urbo de USSR. Ni pasigis agrablajn horojn inter interesaj homoj el diversaj landoj dum la akcepto, aranĝita honore al la gastoj. Ĉe nia forveturo Petro venis al la flughaveno por akompani nin. En niaj konversacioj ni interŝanĝis pensojn ankaŭ rilate la planojn por estoni agad de la Komisiono, kiun li gvidas, por apliko de Esperanto en la laboro por firmigo de la amikeco kaj la paco inter la popoloj. Petro laboras sur tiu ĉi kampo kun enviinda energio kaj junula entuziasmo.

*

Uzbekistano estas antikva lando kaj juna soveta respubliko. Vizitante ĝin, vi povas vidi

Vizito de karaj gastoj

Je la 12 de novembro 1972 en la Moskva Internacia E-Klubo (MIEK) okazis vespero, dediĉita al la Tutmonda Tago de l'Junularo kaj la Internacia Tago de l'Studentoj. La kunvenon ĉeestis karaj gastoj, aktivuloj de l'Internacia Junulara E-Movado, venintaj por partopreni en la laboroj de la Moskva Internacia Konferenco de la Tutmonda Laborista Junularo: k-dino Flora Sabó-Felso (Hungario), k-do Detlev Blanke (GDR) kaj d-ro Hans Eichorn (GDR). Ili estis varme renkontitaj de la moskvaj samideanoj.

K-dino Sabó, ĝenerala sekretario de TEJO, volonte rakontis pri la aktiva partopreno de la delegacio de l' E-junularo en ĉiuj junularaj internaciaj iniciatoj. Ŝi invitis la moskvan junularon amase partopreni en la Berlina Festivalo de Junularo kaj Studentoj estontjare.

D-ro Hans Eichorn raportis pri la grandaj preparaj laboroj de Centra Laborrondo Esperanto en GDR por la Berlina Festivalo kaj same petis, ke la sovetaĵ gejunuloj vizitu tiun ĉi gravan forumon.

La redaktoro de „Der Esperantist“ k-do Detlev Blanke transdonis varman saluton al la moskvaj samideanoj fare de la germanaj esperantistoj, kaj persone de k-do Rudi Graetz, kiu antaŭ nelonge vizitis Sovetunion. Li rakontis pri la aktiva laboro de Centra Laborrondo Esperanto en GDR, kiu unuigas kaj sukcese gvidas la laboristan E-movadon, zorgas pri la E-eldonaĵoj, pri disvastigo de Esperanto inter la gejunuloj, zorgas pri fervora kunlaboro kun la sovetaĵ E-organizaĵoj, batalas por paco kaj amikeco inter la popoloj.

Moskvanoj varme akceptis la informojn kaj invitojn de la gastoj kaj faris multajn demandojn, al kiuj ili ricevis plenajn respondojn.

Iom pli poste k-do Aroloviĉ Viktor, estrarano de MIEK, detale rakontis pri la sukcesa renkontiĝo de sovetaĵ gejunuloj dum la Oktobraj festoj (6, 7, 8-XI-72) en Ivanovo, kie partoprenis esperantistoj el Kolomna, Kostroma, Ĥarkov, Moskvo, Gorkij kaj Ivanovo mem. Dum la 3-taga kunesto realiĝis multaj E-ini-

tre interesajn aĵojn: majestajn monumentojn de l'antikva kulturo, belegan kaj varian naturon, radikalajn sociajn, ekonomiajn kaj kulturajn reformojn, efektivigitajn ĉe la soveta potenco fare de la talenta, laborama kaj pacama uzbeka popolo en la komuna familio de la Sovetaĵ Socialistaj Respublikoj.

Nikola Aleksiev

*prezidanto de Mondpaca Esperantista
Movado (MEM), membro de la Monda
Packonsilantaro*

ciatoj. Unue, en la E-Klubo oni honoris la veteranon de la E-movado en la regiono de Ivanovo (urbeto Rodniki) — k-don Penĉalov A. F. Due — k-do Vjaĉeslav Ivanov rakontis pri interesa vizito al Karl-Marx-Stadt (GDR), pri E-renkontiĝo tie kaj pri vizito al Dresdena Bilda Galerio. Poste en amika rondo sonis E-kantoj, ŝercoj, amuzoj, okazis dancado ktp.

Oni ankaŭ aranĝis: pedagogian seminarion, montris Esperantlingve sonigitajn kino-filmojn, aranĝis vesperon de gajuloj kaj konjektemuloj, ekspozicion de esperantaĵoj, grandan bankedon, ekskursojn, improvizitajn teatraĵojn, konkursojn kaj adiaŭan balon en Ivanova Pedagogia Instituto, dum kiu oni elektis „Miss Esperanto“ — Svetlana Smetanina el Ivanovo. K-do Leo Medvedev rakontis pri la Moskva Lingvistika Konferenco, okazinta en oktobro ĉ. j.

Ĉiuj aranĝoj estis je alta lingva, bona kaj amikeca nivelo kaj por longa tempo faris bonan impreson al ĉiuj gejunuloj.

K-do Danovskij N. F. informis la ĉeestantojn pri la ĵus aperinta libro „La kvardekunua“ de Boris Lavrenev en traduko el la rusa fare de grupo da esperantistoj el la E-Klubo de la Instruistoj.

Informas ing. Teodoro Kulagin

JUNULARA TENDARO APUD MOSKVO

Certe ankoraŭ neniam la naturo tiel malhelpis al esperantistoj. Kiam la rigano Viktor Aroloviĉ alveturis la tendaran urbeton en Podmoskovje, kie devis okazi la somerkolektiĝo de junaj esperantistoj, tie brulis arbaro. La organizantoj de la tendaro komencis per tio, ke per sablo plenŝutis brulantan marĉon. Estis decidite tute ne uzi fajron en la tendaro, la manĝaĵon veturigi el manĝejo, fumi en lokoj severe fiksitaj por tio kaj, kompreneble, neniam brulŝtiparoj. Ĉiuj partoprenantoj ricevis instrukciojn kaj iĝis libervolaj fajrobrigadanoj.

Kaj jen la somera tendaro komencis sian vivon. Alvenis turistoj el Vilnius, Riga, Alma-Ata, Taŝkent, Ĥarkov, Vladivostok kaj ankoraŭ el deko da urboj. El Omsk alvenis laborbrigado „Esperanto“, kiu ĵus estis fininta sian laboron. En la tendarurbeto sur la bordo de rivero Oka Esperanto sonis matene — dum la ekzercoj, vespere — dum la koncertoj, kaj post meznokto — en kantoj.

En la tendaro oni arde diskutis pri diversaj problemoj.

Kompreneble, necesis neniun agiti pri Esperanto. La komencantoj lernis la lingvon en rondetoj. Sed kiuj iam lernis ĝin, ili ĝuis la belsonecon de la lingvo dum kunvenoj kaj koncertoj kaj dum la tradicia festo de Neptuno, kiam ne nur la dio, sed ankaŭ la diabloj parolis en Esperanto. Dum la tendarfina balo okazis elektoj de „Miss“ kaj „Mister Espe-



La mastroj-organizantoj de la XIV-a Baltlanda Esperanto-Tendaro (BET) ĉi-jare estis estonoj. La Tendaro estis aranĝita en unu el la plej pitoreskaj kaj allogaj anguloj de la lando — en vilaĝo Häädemeeste, Pärnu-distrikto, situanta sur la bordoj de Balta Maro kaj rivero Pärna.

Krom baltlandanoj la tendaron ĉeestis reprezentantoj el pluraj respublikoj de tuta Sovetunio. Sume aliĝis 170 personoj. Pro nesufiĉeco de la spaco la tendaranoj, precipe la junularo, kunportis proprajn tendojn. Tial la XIV-a BET certe havis karakteron de „tendaro“.

La malfermo okazis ne en salono, kiel kutime, sed sub la ĉielo. Malferman paroladon faris s-ano J. Ojalo — prezidanto de Talina E-Klubo. Interalie li notis la fakton, ke post la enkonduko de fakultativa instruado de Esperanto en iujn mezlernejojn, al BET alvenas multaj novaj fortoj — la junularo. Estiĝas do tre bonvena la rolo de la instruistoj de Esperanto. Akre aktualiĝas la neceso, ke la baza afero de la programoj de BET estu ĉefe la *lingva demando*. Kaj vere dum la tuta tempo de la tendaro kiel ruĝfadenon manifestiĝis ĝuste la atento pri akiro de pli profundaj lingvokompetencoj. Ekde la unua tago post la malfermo organiziĝis E-kursoj, triklasaj: A-klaso (instruistoj: M. Mandrik, blankruso), B-klaso (instruistoj: A. Rogov, ukraino), C-klaso (instruistoj: B. Tokarev, ruso). La C-klasanoj faris ekzamenojn kaj ricevis specialajn diplomojn kun la rajto instrui la lingvon.

En la tendaro estis ankaŭ la tradiciaj programpunktoj: funkciis E-ekspozicio, kies enhavon estigis variaj libroj kaj periodaĵoj, krome, kiel subfaktoj — „Esperanto en estonaj nuntempaj periodaĵoj“, „Estintaj BET-oj“ (fotokroniko, kies aŭtoro estis la fervora BET-fotisto s-ano A. Straumanis), „Laboro de la Klaipeda E-Klubo“. Starigante la ekspozicion multe da koro enmetis ges-anoj Alma Lekko, Eliza Ojaste kaj A. Munak.

Gravan dignon al la tendaro aldonis la funkcianta Somera Universitato kun rektoro doc. B. Tokarev. Estis faritaj la jenaj prelegejoj: A. Tood — „Kio estas Häädemeeste?“, J. Ojalo — „K. Peterson — la unua estona poeto,

1801—1822“, A. Vellner — „La tradicioj de niaj esperantistoj“, A. Ĥarkovskij — „La lerolibro de d-ro A. Skalskij“, B. Tokarev — „Psikologio de la instruado“, A. Rogov — „Prepozicio de en Esperanto“, A. Vaitilavičius — „Pri la sinonimoj en Esperanto“, A. Masenko — „La blinda poeto A. Jaroŝenko“, B. Tokarev — „La originala prozo en Esperanto“.

Dum la tempodaŭro de la tendaro okazis fakkunvenoj de instruistoj, naturamikoj, junularo. Dum vesperkrepuskoj oni ĝuis kelkajn koncertojn: varie prezentis sin la trupo de la Riga E-Klubo de Blinduloj, direktata de nia poetino L. Jevsejeva, bonsukcese improvizis Klaipeda E-Klubo k. a.

Ĉiutage manifestiĝis jen tiaj, jen aliaj programeroj. Sed oni ankaŭ ne preteratentis la ripozon, la distrojn. Estis organizataj interesoplenaj ekskursoj al la antikva estona urbo Pärnu; la tendumantoj ĉiutage svarmis sur la mar-strandoj, konkurante okupi la platstonegan „lito“; okazis piknikoj al mirindaj pinarbaraj anguletoj; dum la vesperkrepuskoj lignofajroj, dancoj, ludoj, komunaj kantadoj altiradis precipe la junularon.

La murgazeto estis „tonodonanta barometro“. Interalie per aparta rubriko ĝi vipis „la krokodilojn“:

Kelkaj homoj krokodilas
de mateno ĝis vespero,
sed al ili ni konsilas
ĉesi jam pri ĉi afero.

En la tendaro regis vere amika kaj samideana atmosfero. Kazaĥoj el Alma-Ata, rusoj, ukrainoj, blankrusoj fratiĝadis kun estonoj, latvoj, litovoj, poloj, judoj. Ĉiujn ilin unuigis unu kaj sama lingvo. Ĉiuj, ŝajne, portadis en sia koro la konatan eldiron de Henri Barbusse: „Strange estas por internaciistoj ne paroli internacian lingvon“.

En la ferma kunveno la Organiza Komitato de la XIV-a BET oficiale transdonis la malhisitan flagon al la litova delegacio, ĉar la XV-a BET en 1973 okazos en Litovio. La tendarado finiĝis per amika balo, iniciatita de la litova delegacio per la tosto: „Dankon al la esperantistaro estona!“

Juzefine Baliene

ranto“. La titolojn oni disdonis ne nur pro ĉarmo, sed ankaŭ pro aktiva partopreno en la E-movado kaj lingvoregado. Olja Manjušina el Ufa kaj Ŝahmat Mutalov el Taŝkent estis la feliĉuloj.

En la tendaro oni sumigis la rezultojn de la socialisma konkurado inter la kluboj de Pjunaj esperantistoj. Oni prikonsideris ĉion — eksterlandaj E-tendaroj kaj, kompreneble, propagandon de Esperanto. La unuan lokon oku-

pis la E-Klubo de Klaipeda, kiu ricevis premion la Plenan Ilustritan Vortaron, la duan lokon okupis riganoj.

Trista estis la disiĝo. La tuta 104-membra partoprenantaro de la tendaro longe memoris la gastaman Podmoskovje.

A. Ĥarkovskij
Etrusigis: T. Arbergs
(El „Sovetskaja Molodjoĝ“, 8. X. 1972, Riga)

En la konferenc-halo de la Instituto de Rusa Lingvo ĉe la Akademio de Sciencoj en USSR la 24—27-an de oktobro 1972 okazis kunsidoj de la lingvosciencaj konferenco je temo „Interrilatoj de la naturaj kaj artefaritaj lingvoj“.

Dum kvar tagoj sciencistoj-lingvistoj pri-diskutis multflankajn aspektojn de la lingvaj problemoj, konsideris detalojn de la interligoj de diversaj homoj kiel interne de nacioj kaj popoloj, tiel same inter nacioj el diversaj kontinentoj.

Speciale interesa estis la kunsido en la lasta tago, la 27-an de oktobro, kiam kolektiĝis pli ol 100 personoj. La fundamentan bazan raporton faris docento Magomet Isaev (Moskvo) je la temo „Naturaj kaj artefaritaj lingvoj de la tutmonda interkomunikado“. La raportanto tre konvinke karakterizis la progreson de la aktualaj internaciaj interrilatoj kaj samtempe la neceson de utiligo de rimedoj de internacia interkomunikado.

La utiligataj en UNO nuntempe 5 naciaj lingvoj (kaj estonte — ĝis 12 lingvoj!) ne-niel solvas tutplene la lingvan problemon, ĉar postulas intensan laboron de multaj tradukistoj kaj konsumon de grandaj materialaj rimedoj. Tio devigas urĝan solvon de la problemo utiligi ununuran lingvon de internacia komunikado.

Multnombraj esploroj kaj eksperimentoj pruvas, ke por la rolo de nura lingvo de internacia komunikado entute taŭgas Esperanto, sukcese aplikata en ĉiuj landoj jam dum multaj dekoj da jaroj.

La kunraportantoj de doc. Isaev estis:

1. S. N. Kuznecov (Moskvo), kiu faris informon „Al la problemo de tipologia klasifiko de internaciaj artefaritaj lingvoj“. En ĝi li sufiĉe detale karakterizis kelkajn internaciajn lingvojn, dividante ilin laŭ niveloj de komplikeco, konstruo kaj aliaj funkciaj apartecoj. Rezulte de la komparo evidentigis, ke la avantaĝo estas je la flanko de Esperanto.

2. V. P. Grigorjev (Moskvo) raportis pri kelkaj problemoj de normaligo de la strukturo de l' internacia lingvo Esperanto. Li tre konvinke pruvis, ke la normala evoluo de Esperanto estas nun konvena al la aktuala situacio kaj tute klara socia fenomeno, kiel tio okazas en la naciaj lingvoj.

3. V. A. Vasiljev (Moskvo) parolis pri la strukturo-lingvaj, lerno-metodikaj, ekonomiaj kaj socio-lingvaj premisoj por ĉiutaga apliko de lingvo de internacia komunikado. Li objektive aprezis la ekzistantan nun staton de tiu ĉi problemo, menciis pri la sukcesa utiligo de Esperanto en la organizaĵoj de UNESKO kaj pri la malperfekteco de la maŝina tradukado.

4. Prof. D. L. Armand (Moskvo) citis multajn praktikajn ekzemplojn pri la ebleco de Esperanto kiel lingvo de scienca informado kaj proponis presigi resumojn de sciencaj artikoloj en Esperanto en formo de slipoj, el kiuj poste oni povas kompili sliparon laŭ koncernaj fakoj de la scienco.

5. D-ro A. I. Vajtiŝaviĉus (Vilnius) karakterizis la vortaran enhavon de Esperanto kompare kun la vortaroj de la naciaj lingvoj. La parolanto notis, ke la eblecoj de vortkonstruado en Esperanto estas preskaŭ senlimaj, kio donas al ĝi avantaĝon kontraŭ la lingvoj naciaj.

6. E. A. Mozerts (Riga) parolis pri la rilatoj inter la „naturaj“ lingvoj (latva, rusa, angla) kaj la artefarita internacia lingvo Esperanto. Li detaligis la problemon de interferenco kaj transferenco dum la komparo de apartaj lingvoj kaj iliaj gramatikaj specifaĵoj, la influon de unu lingvo al alia dum ilia samtempa lernado.

7. A. M. Lihtgejm (Moskvo) parolis pri temo „Grafiko kaj ortografio de la naturaj kaj artefaritaj lingvoj de internacia komunikado“. La parolanto tuŝis la komplikecon de l' ortografio de kelkaj naciaj lingvoj kaj la malfacilecon de ĝia posedo, dum la ortografio de Esperanto estas tre simpla kaj bone komprenebla; en ĝi al unu litero respondas nur unu difinita sono, kio tre simpligas ĝian posedon.

La lingvistika konferenco pasis sur alta scienca nivelo. Sendube ĝi donos tre pozitivan rezulton por la praktika utiligo de la internacia lingvo Esperanto kiel lingvo tre taŭga por internacia komunikado.

Ing. T. Kulagin

Esperanto-kursoj en Ĥarkov

En oktobro en Ĥarkov ekfunkciis 3 E-kursoj por komencantoj.

Grupon de 63 gekursanoj (inĝenieroj, teknikistoj, studentoj) ekgvidis s-ano Abraham Klimovskij. Malgraŭ sia aĝo (79-jara) la E-veterano, esperantisto de 1908. jaro, laboras senlace por nia afero, konstante disvastigas la Internacian Lingvon, gvidante kursojn.

Duan grupon ekgvidis s-ano Julio Lupickij, lia instruisto. La grupo konsistas el 33 gekursanoj. Ambaŭ grupoj funkcias en la Ĥarkova Politeknika Instituto. Por la malfermo de tiuj kursoj helpis ankaŭ la Distrikta Komitato de la Komunista Partio.

Komencis funkcii ankaŭ tria grupo el 27 instruistoj kaj studentoj el la superaj pedagogiaj lernejoj. Ĝin gvidas la sperta esperantisto Ivan Bril, delegito de UEA.

A. K.



En la fino de oktobro rondvojaĝon tra Estonio faris la E-lernantoj el la latva lernejo en Ziemei, kie la Internacian Lingvon instruas la konata E-pedagogo Arturs Kubulnieks. La E-klaso kaj la lerneja knaba koruso, entute pli ol 50 gelnantoj, sub la gvido de A. Kubulnieks kaj ĥorestro Otto Briedinš, prezentis al la estonaj lernejoj E-kantojn en Tõrva, Sindi, Viljandi kaj Vastse-Kuuste, kie la koncertojn ĉeestis la lokaj lernejoj. Tio estis bonega propagando pri Esperanto. En Viljandi kaj en Vastse-Kuuste, kie funkcias la unuaj en Estonio lernejoj E-rondoj, la koncertoj estis tre emociaj. La latvan koruson gvidis memstare ankaŭ la okjara filineto de Otto Briedinš, la eta Ilse, kiu jam bone lernas Esperanton kune kun siaj du fratinoj. La rondvojaĝo sukcesis bonege kaj vekis intereson ĉie inter la lernejoj. La tuta iniciato estis dediĉita al la 50-jariĝo de Sovetunio.

*

En la plej nova kaj moderna mezlernejo de Tallinn (n-ro 32), kie oni krom la kutima lerneja programo havas ankaŭ teatran klason, okazis interkona vespero de Esperanto. Laŭ iniciato de la instruistino de estona lingvo s-anino Helju Viires estis aranĝita malgranda

ekspozicio en la lernejo kaj ges-anoj Raja kaj Johannes Palu parolis pri la Internacia Lingvo kaj pri siaj vojaĝoj al eksterlando per Esperanto. La ekspozicio kaj la paroloj vekis grandan intereson kaj nun en la lernejoj oni organizos kursojn sub la gvido de s-anino Viires.

*

Inter la estonaj esperantistoj kaj la naturamiko jam dum jaroj estas bona kunlaboro. Ankaŭ venontjare la estonaj esperantistoj kaj la Estona Naturdefenda Societo aranĝos specialan Semajnon de Naturdefendo sub la titolo „Esperanto kaj naturo“. Ĝi okazos dum la unua semajno de julio en sudestona pitoreska loko ĉe urbeto Rāpina. Oni atendas partoprenontojn ankaŭ el Latvio kaj Litovio.

*

Jus aperis nova turista broŝuro pri Estonio, 32-paĝa, kolorbilda, eldonita de la ŝtata eldonejo. Antaŭstaras la apero de la dua libro el la serio de estona literaturo en Esperanto, la premiita verko de l' estona verkisto Erni Krusten „Okupacio“ kiel sekvo al la jam aperinta kaj disvendita „Kusanta tigro“ de Lilli Promet. Estonio estas nun la sola soveta respubliko, kiu eldonas E-tradukojn el sia literaturo.

Johannes Palu, Estonio

GEORGI DIMITROV ESTAS ANKAŬ NIA HEROO

El la salutparolado de k-do RUDI GRAETZ al la 38-a Kongreso de BEA

Por ni, la esperantistoj de GDR, la agado kaj sinteno de Georgi Dimitrov estas heredaĵo kaj sindevigo.

Al ĉiuj homoj en GDR bone estas konata la grandioza rolo, kiun ludis Georgi Dimitrov por la germana laborista movado, por ĉiuj progresemaj fortoj de la germana popolo.

Neforgesebla restos lia kuraĝa disputo dum la proceso antaŭ la faŝista tribunalo, kiam li estis akuzita, ke li krimbruligis la germanan parlamentojn. La celo de la faŝistoj estis tiamaniere frapi kaj disbati la komunistan movadon. Sed Dimitrov mem fariĝis akuzanto, kiu en la proceso demetis la maskon de la veraj krimbruligantoj — la faŝistoj.

Arestita de Hitler-faŝistoj dum la jaroj 1933 kaj 1934, mi aŭdis unuafoje pri Georgi Dimitrov en malliberejo. Jus arestita

persono rakontis al mi, kion fiplanis la faŝistoj kontraŭ k-do Georgi Dimitrov.

Baldaŭ mi mem staris antaŭ la tribunalo kaj poste preskaŭ dum unu jaro restis sola en la ĉelo. Iun tagon mi estis transportata de Büttow al Rostock kaj sidis apud la maljuna k-dino Anna Poerschke. Mi povis iomete flustri kun ŝi. De ŝi mi ricevis en taŭga momento paĝon de gazeto, kiun ŝi por mallona tempo kaŝis en la buŝo, kun vortoj de k-do Dimitrov antaŭ la tribunalo en Leipzig.

Kiam, fine de 1934, mi revenis hejmen, mia edzino donis al mi kolekton de legalaj gazetoj, kiuj raportis pri la proceso en Leipzig. Vi bone komprenas, ke aŭde mi legis ĉiun vorton de Georgi Dimitrov.

Depost tiu tempo Georgi Dimitrov estas nenur via heroo, sed ankaŭ nia!

La amikeco inter Sovetunio kaj socialisma Bulgario estas kristale pura kaj nenio povas ĝin malheli.

LEONID BREĴNEV

Kun profunda emocio ni juras esti ĉiam indaj nomi nin kamaradoj kaj kunlaborantoj, fratoj kaj fratinoj al la sovetaĵ komunistoj, al la sovetaĵ homoj!

TODOR ĴIVKOV



NEFORGESEBLA CELEBRO DE L'ARTISTO-ESPERANTISTO ANANI ANEV

La 19-a de novembro estis vere vintra tago — malvarma, venta. La tero — kovrita de neĝo. Tamen la malagrabra vetero ne estis obstaklo, por ke la salono de Muzikteatro „Stefan Makedonski“ en Sofio estu plenplena je spektantoj. Ĉi-vespere en la salono kaj la antaŭsalonoj

regis aparte vigla atmosfero, ĉar la Direkcio de la Teatro, la sindikata kaj la partia organizaĵoj organizis solenan celebren de la 35-jara teatra agado de la elstara aktoro Anani Anev. La jubileulo plenumis la rolon de ministro Baltov en la muziklo „Ĉasantoj de oficoj“ — laŭ teksto de nia klasikulo Ivan Vazov kaj muziko de P. Haĝiev. La dankema kaj ĉarmita publiko multfoje aplaudis lin.

Post la fino de la spektaklo sur la scenejo aperis unu post alia reprezentantoj de multaj delegacioj el urboj kaj institucioj, kie Anani Anev laboris kiel teatra direktoro, reĝisoro kaj artisto. La tuta scenejo dronis en bukedoj kaj korbetoj kun diverskoloraj floroj. La jubileulo ricevis ankaŭ multe da originalaj kaj interesaj donacoj.

En la nomo de CK de Bulgara Esperantista Asocio kun varmaj kaj kortuŝaj vortoj salutis la artiston la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ k-do Kunĉo Vălev. Li enmanigis al li memor-donacon — brakhorloĝon kun gravurita E-teksto kaj belegan florkorbeton. Salutis la jubileulon ankaŭ s-anino Neli Abaĝieva en la nomo de la esperantistoj-fervojistoj, kaj s-ano Bojĉo Mladenov — en la nomo de la unua en Bulgario lernejana E-societo „Verda Raketo“ en urbo Vraca, speciale veninta por la celebros.

La salutparoladoj en la nomo de esperantistaj organizaĵoj forte impresis la multegan neesperantistan publikon. Tiel la celebros de l'amata artisto-esperantisto estis ankaŭ efika propagando pri nia E-afero.

Vasja Petrova

SALUTPAROLADO AL LA ARTISTO ANANI ANEV

*en la nomo de CK de Bulgara Esperantista Asocio, farita de Kunĉo Vălev
Karega kaj atestimata k-do Anev!*

Vi rajte devas fieri ĉi-vespere, kiam la emociita publiko tondre aplaudas vin: jam 35 jarojn vi plezurigas ĝin per via temperamenta aktora talento. Tridek kvin jarojn sur la scenoj de la bulgaraj teatroj vi majstre kreas neforgeseblajn artfigurojn kaj instruas nin malami ĉion, kio estas malbona, malbela kaj malinda en la vivo, varme ami la popolon kaj sindone labori por ĝia bono kaj feliĉo. Pro ĉio ĉi ni tutkore dankas vin!

Sed nun, kiam vi festas vian 35-jaran artistan jubileon, ni, la bulgaraj esperantistoj, havas ankoraŭ unu — specialan — motivon esti aparte ĝojaj kaj fieraj: jam pleniĝas 15 jaroj ekde kiam vi ludas ankaŭ sur la Esperanta sceno! Vi estas unu el la fondintoj de la Bulgara Esperanta Teatro, en kiu vi brile manifestis vian talenton de aktoro, reĝisoro kaj sursceniganto. Tial nun vi plenmerite festas duoblan jubileon!

15 jarojn — ĉu kun la tuta trupo de la Bulgara Esperanta Teatro, ĉu kun parto de ĝi aŭ kun via vivkamaradino, la talenta aktorino Belka Beleva — vi prezentas nian nacian teatroarton al la ekstera mondo enkadre



de universalaj kongresoj de Esperanto: en Varsovio, Split, Hago, Amsterdamo, Budapeŝto, Varna, Helsinki, Londono k. a. Via lasta ĉi-jara brila sukceso sur E-sceno estis en Lugano — Svislando, dum la Kongreso de l'Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj.

Sed kiel vera demokrato kaj esperantisto vi estis kaj estas preta doni la fruktojn de via arto al la esperantistaj amasoj ĉiam kaj ĉie, kie ili vivas kaj laboras aŭ festas: ĉe niaj enlandaj E-kongresoj, festivaloj, laborbrigadoj, ĉe solenaĵoj aŭ tute ordinaraj kunvenoj. . . Ĉiam kaj ĉie vi plenumis senrifuze vian Esperanto-devon.

Per via tuta agado kiel aktoro-esperantisto vi estas fiero por la bulgara E-movado!

En la nomo de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio mi salutas vin pro via duobla jubileo kaj mi bondezias al vi aukoraŭ longajn jarojn havi firman sanon kaj tiun ŝprucantan, neelĉerpeblan energion karakterizan por vi. Tutkore ni deziras al vi novajn grandajn sukcesojn sur la Esperanta sceno — enlanda kaj internacia!

Letero de Anani Anev

Sofio, la 30-an de novembro 1972

Al k-do Nikola Aleksiev
Prezidanto de Bulgara
Esperantista Asocio

Estimata kamarado Aleksiev,

Plej sincere mi dankas al la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio kaj persone al Vi pro la varma saluto, belaj floroj kaj karmemora donaco, kiuj estis prezentitaj al mi en la nomo de l'Asocio lige kun mia 35-jara teatra agado.

Mia modesta festo koincidas kun la fakto, ke jam 15 jarojn mi laboras kiel aktoro kaj reĝisoro de Bulgara Esperanta Teatro, kies kunfondinto mi estas. Tio estis menciita ankaŭ en la belega salutparolado de k-do Kunĉo Vălev kaj forte impresis la ĉefurban kulturan publikon kolektiĝintan okaze de mia celebrego en la salonon de la Muzikteatro. Mi aparte ĝojas, ke tiu ĉi celebrego estis ankaŭ bona propagando pri la internacia lingvo Esperanto.

Ankoraŭ foje mi tutkore dankas pro la atento, kiun la Asocio esprimis al mi!

Mi restas fidela al la nobla Esperanto-afero.

Kun estimo

Anani Anev

Sur la sceno de la Muzikteatro:
saluton al A. Anev en la nomo de CK de BEA

INTERDISTRIKTA RENKONTIĜO HONORE AL LA 50-a JUBILEO DE USSR

Forta kaj multjara amikeco ligas la bulgarn kaj sovetajn esperantistojn.

Laŭ iniciato de la Distrikta E-Komitato en Ŝumen kaj per la helpo de la Distrikta Komitato de Bulgara-Soveta Amikeco la 12-an de novembro en Ŝumen estis organizita impona festkunveno okaze de la 50-a datreveno de la fondiĝo de USSR. Kolektiĝis esperantistoj el Ŝumen, Ruse, Varna, Târgoviște, Gorna Orjanovica k. a. La interdistriktan renkontiĝon partoprenis k-doĵ Denjo Popov — vicprezidanto de la DK de Bulgara-Soveta Amikeco, kaj Nikolaj Pârvanov — membro de l'Estraro de



GRAVA SUKCESO

Rezulte de klopodoj de la Sofia Distrikta Esperanto-Komitato, la fako „Popola Instruado“ ĉe la Distrikta Popola Soveto per letero Nr. 4253 de 2. X. 1972 enkondukis fakultativan instruadon de Esperanto en la jenajn lernejojn:

1. Fundamenta lernejo en fervojstacio Elin Pelin — kun instruisto Ilija Kolev;
2. Mezlernejo „Asen Zlatarov“ en u. Godeč — kun instruistino Maria Angelkova;
3. Fundamenta lernejo en v. Stolnik — kun instruistino Stojanka Ceneva;
4. Mezlernejo en u. Zlatica kun instruistino Stojanka Petrova;
5. Fundamenta lernejo en v. Vakarel — kun instruistino Nadejda G. Vučkova.

Karaj esperantistoj el la tuta lando, klopodu obstine kaj argumentite pri la samo en viaj distriktoj kaj vi nepre havos sukceson! La enkonduko de fakultativa instruado de Esperanto en la lernejojn surbaze de la programo, aprobita kaj eldonita ĉi-jare de la Ministerio de Popola Instruado, estas gravega tasko de nia E-movado nun! La ekzemplo de la Sofia DK estas imitinda kaj imitenda!

E-kursoj en Plovdiv-distrikto

En Plovdiv la nova E-lernojaro komenciĝis je la 12-a de oktobro. La urba E-societo „Kulturo“ organizis kurson, kiun vizitas 15 personoj. Instruas Esperanton Nikolaj Bojaĝiev.

La 24-an de oktobro estis malfermita E-kurso por komencantoj ankaŭ ĉe la societo de blindaj esperantistoj „Lumo“. Partoprenas 15 gekursanoj. Kursgvidantino Eva Bojaĝieva.

En u. Karlovo ankaŭ ĉi-jare ĉe la popola legejo „V. Levski“ estis malfermita kurso de Esperanto por komencantoj. Partoprenas 15 gekursanoj. Kursgvidanto Bojidar Leonov.

Fani Mihajlova

Dana esperantisto en Bulgario

En oktobro la dana inĝeniero Breben Bagger vizitis nian landon. Oficiala reprezentanto de la dana Kulturministerio, inĝ. Bagger estis gasto de la Komitato de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando. La celo de lia vizito en nia lando estis kontrakti turneon de in elstara bulgara pupteatro en Danlando. La gasto restis en nia lando unu semajnon.

Kiel gimnazia instruisto de fiziko, intere-

sata pri la sistemo de instruado en Bulgario, inĝ. Bagger vizitis la Sciencesploran Instituton de Instruado „Todor Samodumov“, kie en amika interparolo kun reprezentantoj de la instituto estis diskutitaj ĝeneralaj problemoj de instruado kaj pli speciale de instruado de Esperanto en la lernejoj de ambaŭ landoj.

S-ro Bagger vizitis la vidindaĵojn de nia ĉefurbo, ĉeestis du spektaklojn de la Centra Pupteatro de Sofio kaj ekskursis al Vitoŝa, atingante la montosupron „Ĉerni Vrah“. La grimpado al tiom alta montosupro (2290 m) estis emocia evento en la turista vivo de nia gasto, se oni konsideras, ke la plej alta monto en Danlando, nomata Ĉiela Monto, estas alta... nur 170 m.

Ekster Sofio s-ro Bagger vizitis la Internacian Foiŝon de Plovdiv, la tiean pupteatron kaj fine la apuddanuban urbon Ruse. Rezulte de interkonsentoj kun la direkto de la loka pupteatro, en la nomo de la Dana Kulturministerio s-ro Bagger subskribis kontrakton pri 10-taga turneo de la Pupteatro de Ruse en Danlando, kie ĝi prezentos en Esperanto la fabelon „La neĝa princino“ de Hans Andersen. Motivante sian preferon al prezentadoj en Esperanto nia gasto deklaris: „En mia lando ni havas multajn homojn kaj lernantojn, kiuj komprenas Esperanton, sed eĉ ne unu personon, kiu povas kompreni vian nacian lingvon.“

La vesperon antaŭ lia forveturo, en la Sofia Universitato la Instruista Societo „Diĉo Petrov“ organizis amase vizititan kunvenon. En perfekta Esperanto s-ro Bagger parolis al la kunveno pri la agado de la Dana Esperantista Ligo, kies vicprezidanto li estas, kaj pri la tre favora rilato de la danaj kulturaj institucioj al Esperanto, kiuj jam enkondukas ĝin en la kulturan vivon de sia lando.

El Sofio inĝ. Bagger forveturis al Zagreb, Jugoslavio, por partopreni la ĵurion de la Internacia Festivalo de la Esperantaj Pupteatroj.

K. Drajev

(el paĝo 11)

CK de BEA. Post belarta programo plenumita en bulgara lingvo kaj Esperanto raporton pri la glora jubileo de la Soveta Ŝtato faris k-do Canko Murgin el la Supera Pedagogia Instituto de Ŝumen. Li atentigis, ke vice kun la grandegaj sukcesoj de la soveta popoloj en la konstruado de socialismo, aŭtoritaton havas ankaŭ Esperanto. La E-movado en Sovetunio kreskas senĉese.

Estis unuanime akceptita teksto de salutoletero, kiu estos presita kaj dissendota al la multnombraj sovetaj amikoj.

La aliaj gastoj vizitis la muzeon de Vasil Kolarov kaj konatiĝis kun la historia fortikaĵo de Ŝumen.

Cvijatko Todorov



EL LA ELDIROJ DE LA DELEGITOJ

GEORGI DOLAPČIEV — Sofio



konsistanta el nepagataj agantoj, ne havas

Alia demando, kiun mi deziras tuŝi, estas la demando pri la distriktaj komitatoj de nia Asocio. Mi deziras substreki, ke tiu ĉi organiza formo — la distriktaj komitatoj — montriĝis tre konvena kaj bonrezulta. Oni facile povas kompreni, ke la Estraro de CK,

eblecon ĉirkaŭpreni la tutan laboron de la Movado en la tuta lando sen help-organoj kiel la distriktaj komitatoj. Tial en nia sistemo la distriktaj komitatoj devas esti "malgrandaj centraj komitatoj" sur la teritorio de la respektivaj distriktoj — „malgrandaj estraroj de BEA“. Tiamaniere oni povus ĉirkaŭpreni la varian kaj multflankan agadon de nia Asocio, krei bone aranĝitan kaj laborpretan organizaĵon, kiu konstante atingos kreskantajn rezultojn tiel en organiza, kiel ankaŭ en agitpropaganda kaj ide-eduka rilato.

HRISTO MANOLOV — Polŝki Trâmbeŝ



Ni aŭskultis la detalan raporton de CK kaj antaŭ ni denove ekstaras la malnova problemo pri la metodoj de nia laboro. Tiu ĉi problemo lastatempe staris ankaŭ en la tagordoj de nia E-societo „Espero“ ĉe la Bazo por Teknika Evoluado en urbo Polŝki Trâmbeŝ. La nuna jaro estas „Jaro de Dimitrov“, kaj vi scias,

ke Dimitrov avertis: „Amasa laboro, amasa batalo, nenia aventurismo!“ Jen kiamaniere ni provis plenumi tiun postulon.

Nia Societo decidis aranĝi urban ekspozicion sub titolo „La mondo tra la fenestro de Esperanto“, dediĉitan al la Unua de Majo kaj al G. Dimitrov. La urba komitato de Bulgara Komunista Partio ne nur aprobis nian iniciaton, sed ankaŭ varme promesis sian plenan apogon.

Post kelkaj tagoj en la ejon de la Urba Komitato de BKP kunvenis reprezentantoj de aliaj amasaj organizaĵoj por akcepti komunan planon de la ekspozicio. Laŭ ĝi la esperantistoj prenis la taskon organizi la ricevon de materialoj pri la vivo kaj la sociaj bataloj en eksterlando, ankaŭ pri la aŭtoritato de Dimitrov tie. La Kultura Domo devis prepari la ejon. La Urba Konsilantaro de la Profesiaj Unuiĝoj estis komisiita propagandi pri amasa vizito de la ekspozicio fare de la uzinaj kaj

oficejaj kolektivoj. La Komitato de la Paco devis organizi deĵoradon. Konvenajn taskojn ricevis ankaŭ la Komsomolo, la Patrolanda Fronto, la loka gazeto kaj la radio-reto. La Popola Soveto proponis doni el sia buĝeto ĉiujn sumojn necesajn por pagi premiojn al eksterlandaj partoprenintoj en la ekspozicio. La Bazo por Teknika Evoluado promesis pagi ĉiujn poŝtelspezojn por la korespondado kun eksterlando lige kun la aranĝo de l'ekspozicio kaj la sendado de premioj.

Tiamaniere ni havis larĝan terenon kaj solidan financon bazon por laboro. Pro tio fakte la ekspozicio tre bone sukcesis. Ĝin malfermis la sekretario de la Urba Partia Komitato en ĉeesto de la tuta urba aktivularo, de l'distriktaj gazeto „Borba“, de la prezidanto de l'Distriktaj Komitato de la Paco — ĉiuj estis invititaj per speciala invitilo je la nomo de la Urba Komitato de la Partio. Krom en Polŝki Trâmbeŝ la ekspozicio estis prezentita ankaŭ en kelkaj loĝlokoj de nia regiono. Tion gvidis kaj aranĝis la Partia Komitato mem.

Laŭ la sama maniero ni aranĝis duan novan ekspozicion sub titolo „La mondo estimas Georgi Dimitrov“ el materialoj ricevitaĵ de eksterlandaj esperantistoj. Tiukaze ni ricevis ankaŭ multajn memoraĵojn kaj salutleterojn el Kubo, GDR, USSR, Francio, Ameriko, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio. La ilustritajn materialojn, gazetojn, fotojn k. a. ni uzis por la ekspozicio. Kelkaj salutleteroj estis voĉlegitaj dum la oficiala urba kunveno celebre al Dimitrov, aliajn uzis la loka radio-reto. La distrikta radiocentro faris el niaj materialoj specialan programon por la tuta distrikto. La distrikta kaj

Antaŭ la milito en 1941 aperis en „Bulgara Esperantisto“ la poemo de D. Z. — Miti „Printempa rivero“, kies unua strofo sonas jene:

Brusto printempa de sukoj streĉita
drakon brilskvaman mamnutris en mont',
kaj ĝi kun ŝprucaj fajreroj subite
jetis sin ŝvela malsupren de l' font'.

La poeto priskribas la tondran venk-himnon de la rivero kaj finas la poemon jene:

Eta, senpova sur bordo mi kaŭras,
miras kun tim' mia homa mizer':
mi eĉ jarcento-duonon ne daŭros —
fluos jarmilojn ĉi tiu river'!

Dimitr Zlatarski ial supozis, ke li ĝisvivos nur sian 50-an jaron. Mi ĝojas, ke li eraris, kaj ke mi povas publike gratuli lin nun, kiam li iĝos 70-jara. Li havu antaŭ si ankoraŭ multe da enhavoplenaj jaroj, kaj mi esperas, same kiel Zora Mladenova Hans, ke li fininte siajn urgajn taskojn, trovos ree tempon por okupi sin pri Esperanto. Tiel kompetenta esperantisto en lingvaj kaj literaturaj demandoj ne rajtus stari franke de nia Movado. Neniu postulos, ke li okupu sin pri organizaj kaj propagandaj taskoj, sed li laboru sur la literatura kampo. La Esperanta literaturo kreskis — aperis kaj aperas novaj talentaj poetoj kaj verkistoj, estus necese diversflanke pristudi kaj konigi iliajn verkojn, recenzi, kritiki, konsili. Li sendube estas kapabla por tio. Miti ĉiam ŝatis kaj estis interesita pri la Esperanta literaturo. Eble liaj kritikoj estos severaj, sed al mi ŝajnas, ke ĝuste tiu severeco estas bezona, ke ni jam devus esti maturaj por tio.

(el p. 13)

la loka gazeto ankaŭ bone utiligis ilin. Ĉar la materialoj, ricevita de sovetaj gesamideanoj, estis multegaj, ni intencas fari per ili novan trian ekspozicion dediĉitan al la 50-jara jubileo de la Soveta Ŝtato.

Nu, ni faru bilancon. Kion elspezis nia E-societo? Ĝi elspezis eĉ ne unu groŝon. Kaj kion ĝi gajnis? Ĝi gajnis ĉion — terenon, aŭtoritaton, lokon inter la aliaj organizaĵoj.

Vere domaĝe, ke eĉ en Bulgario la nova Esperanta generacio ne bone konas la nomon de Miti, la poeton de l'sopiro, kiu tiel serĉis „La Miraklan Landon, Insulon Blankan de la Revoj“:

Ho, tiu vojo de l' destino!
Ho, sen eklum' la nokto granda!...
Ho, sankta horo, kiam fine
mi vidos la Miraklan Landon!

En sia poemciklo „Nigra Maro“ li havas tre belsonan poemon, kiu komenciĝas jene:

Mian barkon ruinigis ĉe la bord' tempest' aŭtuna,
kaj ĝi kuŝis sur la sablo sub la algoj verde-brunaj.
Kaj kun la doloro muta marŝis mi amar-ebria
sub la pluv' folia.

En la sama poemo li diras:

Kion scias la amikoj pri la koro de l' vagulo,
pri sopir' neestingebila, kiu brilas en okuloj,
kiun eble ne estingos eĉ en lasta mia horo
konvulsi-doloro...

Jes, kion scias la amikoj pri Miti, kiu „havas koron june febran“ kaj kiu „eĉ kiam propra sonoril' funebre eksonos, ridetos tra malgaj“?

Sed malgraŭ ĉio en sia „Letero al amikoj“ li sin jene turnas al ili:

Amikoj miaj,
Miti vin salutas
sendante florojn nun el sia kor'.
El sia granda amo li disŝutis
la benon kiel mirhon el amfor'.
Ho amikeco! La plej sankta vorto,
ĝardeno luma, plena je odor'!...
Amikoj miaj, prenu la senmortajn,
la blankajn florojn de l' amika kor'!

Liaj Esperantaj amikoj atendas, ke li malavare donacu al ili poemojn, tradukojn, ke ni vidu ankaŭ liajn artikolojn sur la paĝoj de la E-gazetaro.

Hilda Dresen

Evidente, tre grava eco de nia esperantista laboro estas la komuna agado kun aliaj organizaĵoj por celoj komunaj, seriozaj, politike gravaj. Sed mi devas aldoni ankaŭ ion alian: sur niaj ekspoziciaj paneloj ne estis sloganoj „Lernu Esperanton“ aŭ similaj. Tamen elirante la homoj diradis: „Vidu, kion faris tiuj esperantistoj! Jen kio estas tutmonda afero!“ Kaj nia ideo estis ĝuste tiu ĉi: per Esperanto fari propagandon por Esperanto! Ni kredas, ke la celo estis atingita.



TRA LA E★ MONDO

NOVA INTERESO PRI LA INTERNACIA LINGVO EN KOLOMBIO

Bogotá, Kolombio. — La intereso pri la Internacia Lingvo rapide kreskas en ĉi tiu sudamerika lando, laŭ raportoj de la Kolombia Esperanto-Ligo. Kaj la ĵurnalo „El Colombiano“ de Medellín kaj „El Espectador“ de Bogotá aperigis plurajn artikolojn tre favorajn al la Internacia Lingvo, kaj la Esperanto-Dialoga Asocio de Medellín lastatempe dissendis, helpe de la loka firmo, pli ol 5000 ekzemplerojn de faldfolio pri la lingvo.

El la Esperantaj leteroj

La 11-an de julio 1972

Mia kara kaj fidela amiko M.!

Vian leteron kune kun la tri ekstraj Georgi-Dimitrov-kovertoj mi bonorde ricevis kaj trege dankas al vi pro ĝi. La ricevo de ĝi kune kun la supre citita enhavo estis vera ĝojo kaj surprizo. Vi trafis miajn imagon kaj deziron! Mi povas konfesi al vi, ke ĉio, kio estas ligita kun la nomo de Georgi Dimitrov, havas grandan signifon por mi! Estis ja ankoraŭ dum mia junaĝo, kiam mi legis pri la proceso en Leipzig 1933, pri la eksterordinaraj kaj grandaj heroismo, persisteco kaj rezisto de tiu ĉi granda gvidanto de la bulgara popolo. La rolo, kiun li ludis en Leipzig kontraŭ la fripono kaj fiulo Göring, estis unika por la tuta homaro! Same kiel Ernst Thälmann (Telman) li estis modelo por mi. Neforgeseble encerbigis al mi la vortoj, per kiuj li senmaskigis la fiagon de la Hitlerfaŝistoj..

La kulmino de miaj respekto kaj adorado al G. Dimitrov estis la vizito kaj rigardo de la G. Dimitrov-maŭzoleo en Sofio okaze de mia vizito ĉe vi. La grandeco kaj la eminenteco de G. Dimitrov estas tute nepriskribbla! Mi bone povas imagi, ke en via tuta lando oni solene celebris lian 90-an naskiĝtagon. Ankaŭ en nia respubliko, almenaŭ en ĉiuj distriktoj, oni okazigis celebrajn arangojn...

Alfred Müller

Karl-Marx-Stadt, GDR

Ne nur informa, sed ankaŭ eduka agado rapide kreskas. En Medellín okazis aŭ okazas koresponda kurso en la „Universidad Pontificia Bolivariana“, kie pli ol 500 interesitoj anoncis sin por la kurso, kaj kursoj ĉe pluraj aliaj altlernejoj: en Bucamaranga kurso kun pli ol 200 lernantoj okazas en la privata „Winston Salem Language Center“. Baldaŭ okazos kurso ankaŭ en la „Universidad Nacional“ en Bogotá. Ĉi tiu ekbulo de intereso staras malantaŭ la decido okazigi en Medellín la unuan tutlandan Esperanto-kongreson en Kolombio.

Kolombio neniel estas la sola centro de intereso pri Esperanto en Latinameriko. La disvastiĝo de Esperanto montras kuraĝigan progreson ankaŭ en Kubo, Peruo, Ĉilio, kaj fortaj movadoj jam ekzistas en Brazilo, Argentino kaj Meksiko. Universala Esperanto Asocio, la organizaĵo, kiu prizorgas la disvastigon de la lingvo tra la mondo, raportas, ke lastatempe la nombro de informpetoj pri la Internacia Lingvo el Latina Ameriko superas tiujn de ĉiuj aliaj mondpartoj, inkluzive Eŭropon.

E-RENKONTIĜO EN LEIPZIG

Esperantista renkontiĝo ree dum la Foiro en Leipzig (GDR) okazos la 10-an de marto 1973 en Klubo de la Inteligentularo „Gottfried-Wilhelm Leibniz“, 701 Leipzig, Elsterstrato 35, je la 19,30-a horo.

Vizitu la esperantistojn en Leipzig!

Klubo Esperanto-Turisma proponas kunlaboron

Ĉe la Esperanto-rondo de Pola E-Asocio en 11. Bytom funkcias Esperanto-Turisma Informejo sub la gvido de s-ano Romuald Wolski. Ĝi helpas diversmaniere esperantistojn-turistojn. La informejo serĉas kunlaboradon. Ĝia adreso: Esperanto-Turisma Informejo, Bytom I, skr. poczt. 264, str. Browarniana 6 (tel. 811-764), Pollando. (Sur la foto — la rondetanoj)





RENKONTIĜO DE DENASKAJ ESPERANTISTOJ

De la 29 de septembro ĝis la 1 de oktobro ĉ.j. en u. Szentendre (Hungario) bonsukcese pasis la Vinberrikolta Semajnofino, kiun partoprenis pli ol 130 esperantistoj ĉeĥaj, slovakaj, germanaj, hungaraj ka.

La lastan tagon okazis renkontiĝo de la „denaskaj“ infanoj-esperantistoj kaj iliaj gepatroj. Ili ĝoje babilis kaj kantis kune. La renkontiĝon ĉeestis ankaŭ juna ĵurnalistino, kiu faris interesan raporton pri la tuta aranĝo en la gazeto „Magyar Hirlap“. Interalie ŝi skribis:

„... La programo estis multkolora kaj varia.

Ĝi estis la plej interesa kunveno de la aranĝo okazis dimanĉe antaŭ tagmeze. Tiam estis la renkontiĝo de la denaskaj esperantistoj... La anoj de la multnacia societo bonege komprenis unu la alian. Eĉ ankaŭ la plej junaj, havantaj nur kvar-kvin jarojn.

— Kiel povas tio okazi?

Al la miranta demando respondis Otto Nógrády, sekretario de la Budapeŝta Komitato de HEA:

— La gepatroj de tiuj infanoj estas esperantistoj. Ili ne en lernejo aŭ en kursoj, sed en la familia rondo kune kun sia geparta lingvo ellernis Esperanton...“

*Laŭ informo de Aleksandro Péter
(El „Budapeŝta Informilo“, n-ro 11/1972)*

NI REĈENZAS

„KUN ONKLO HO“

Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1972,
paĝoj 400

La libro entenas 21 rakontojn verkitajn de elstaraj vjetnamaj kamaradoj, kiuj vivis kaj laboris kun Ho Ŝi Min (Ho Chi Minh) kaj nun okupas gravajn postenojn en Vjetnama Demokratia Respubliko. Ili vivece kaj emocie priskribas la devenon de la prezidento, lian junecon travivitan en Vjetnamio kaj fremdlando, precipe en Francio kaj Britlando, kie li laboris kaj lernis francan kaj anglan lingvojn. Ankaŭ lian estadon en Sovetunio dum la unuaj jaroj post la Granda Oktobra Revolucio. Interesa estas la priskribo de la partopreno de Ho Ŝi Min en la Komunista Internacio, en la politikaj lernejoj de Moskvo, kie li studis profunde la verkojn de Marks-Engels-Lenin.

Kun pligrandiĝanta intereso oni legas la priskribon de la unuaj jaroj de la rezista movado en Vjetnamio, gvidata ankaŭ de Ho Ŝi Min, kontraŭ la francaj okupantoj, kiuj en daŭro de 80 jaroj subigis kaj rabis la vjetnaman popolon, kaj la priskribon de la gverilbatalo kontraŭ la japanaj kaj usonaj okupantoj post la Dua Mondmilito. Sur la fono de grandiozaj eventoj, de kelkdekjara liberiga batalo reliefigas la hela figuro de la plej fama vjetnama filo, portinta dum sia vivo kelkajn nomojn kaj fine Ho Ŝi Min aŭ onklo Ho, kiel ŝatis nomi lin la homoj de Vjetnamio.

La libro estas tradukita en bona Esperanto kaj kaptas tuj la atenton de la leganto per siaj interesaj rakontoj. Ĝi vere firmigas la konvinkon, ke popolo, kiu naskis kaj edukis tiajn filojn kiel Ho Ŝi Min kaj milojn da aliaj batalantoj, verŝintaj sian sangon por liberigo de la patrolando el sub la okupo de la imperiistoj, ne povas esti subigita. Tion komprenas ankaŭ la nunaj usonaj imperiistoj, kiuj fine forlasos la vjetnaman teron, forportante al Usono sian malhonoron, kiel iam tion faris la francaj koloniistoj.

Ni varme rekomendas la libron al ĉiu esperantisto, amiko al la heroo vjetnama popolo.

Tinka Lakova

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la Novan Jaron al siaj multnombraj legantoj, kunlaborantoj kaj abonvarbantoj kaj bondeziras al ili firman sanon, novajn sukcesojn kaj multan feliĉon! 1973-a estu jaro de novaj venkoj de la Esperantomovado, de novaj venkoj de la pacamaj fortoj en la mondo!



La 2-an de aŭgusto 1972 en u. Novosibirsk Sovetunio, forpasis en sia 77-jariĝo la prezidantino de Novosibirska Centra E-Klubo

VARVARA IVANOVA VEREŜĈAGINA

Alte erudita homo, magistro de l'agrikulturaj sciencoj, senlaca propagandisto de la Internacia Lingvo, ŝi praktike realigadis ĝian ideon pri paco kaj amikeco inter la popoloj.

Diplomita pedagogo, organizanto de multnombraj E-rondetoj, renkontiĝoj kaj seminarioj, fondinto de la unua en Siberio oficiala E-Klubo, V. I. Vereŝĉagina estis korespondanto de multaj E-gazetoj kaj tradukanto de belartaj verkoj el la nuntempa soveta literaturo. Ŝi alte aprezis la metodojn de la E-movado en Bulgario kaj konsideris ĝin imitinda.

En la persono de V. I. Vereŝĉagina la E-movado en Sovetunio perdis sian aktivan E-batalanton.

Milica Sokolova

Noto de Red. Ni sincere kondolencas al niaj samideanoj el Novosibirsk!

DEZIRAS KORESPONDI

Anglio

George Frost — 25 Roberts Road, Exeter, Devon (kun ĉi pri ĉt, bk, pm).

Bulgario

Angel Prokopov — Radunci 156, Starozagorsko (24-j. — kun ĉi pri ĉt).

Georgi Notev — str. Struga 3, Jambol (20-j. — pri ĵazmuziko, futbalo).

Vladimir Peev — str. Naĉo Stefanov 13, Varna (24-j. — bk k. a.).

Diamandi Diamandiev — blok „Energija“ — 1, apart. 9. Târgoviște (37-j. elektroinĝeniero — kun ĉi pri ĉt, pm, bk, moneroj, insignoj).

Ĉeĥoslovakio

Jaroslav Houfek — Trebihošť ĉ. 65, okr. Trutnov (33-j. — kun gebulgaroj pri ĉt).

GDR

Hans-Jung Kelpin — Rudolstädter str. 3, GDR — 5211 (37 j. pastoro, kursgvidanto — pri instruado, esperantaĵoj, pm).

Bernd Schaffran — DDR — 253, Warnemünde, Am Markt 3 (18-j. — kun ĉi pri sporto naĝado, muziko, bk, insignoj).

Hungario

Nóra Tólos — Bize, Arpad ut. 83/6 (15-j. lernantino — kun 15-jaraj lernantinoj pri moneroj, bk, pm, insignoj).

Tomaso Kovač — Sigetsentmarton, Orvoš — köz. 7 s. (14-j. lernanto).

Jozefo Czirkó — Damjanich 52, Nagyér (37-j. fervojisto).

Magdalena Rostás — Rózsa u 19, Nagyér (16-j. studentino).

Eva Tóth — Vasutállomás (stacidomo), Nagyér (17-j. studentino).

Margareto Rostás — Rósza u 19, Nagyér (20-j. studentino).

Margareto Hegedüs — Damjanich u 53, Nagyér (18-j. kudristino).

Ludoviko Korsos — Hodmezővásárhely, Fánási u 69-a (70-j. eksfervojisto).

Follando

Leopolda Minkina — Bydgoszcz, ul. Solna 12 bl. 1/1 (24-j. — pri muziko, bk).

Alina Pawelczyk — Bydgoszcz, ul. Solna 12/3 (24-j. — pri muziko, bk).

Janusz Kropiewnicki — Pelpin, plac Mariacki 7, woj. Gdansk (20-j. — pri moneroj, pm, bk, moderna muziko, lingvoj).

Josef Karmowski — Bydgoszcz 21, ul. Koszarowa 9-a/423 (20-j. studento — kun gejunuloj el ĉi pri Esperanto, muziko, bk — en Esperanto, germana, rusa, pola lingvoj).

Maria Dziechiowska — Rabka, ul. Zaryte 15, pow. Nowy Tary (22-j. — pri literaturo, historio — precipe pri la Dua Mondmilito, geografio, sporto, bk, filmoj).

Janina Baniok — Lysa Góra, Internat TC, pow. Brzesko Krakowskie (21-j. edukistino — pri geografio, historio, bk, gram. diskoj).

Janusz Kwapien — Lublin, ul. Lopacinskiego 5/24 (15-j. lernanto — moderna muziko, aviadila trafiko, muzikrevuoj, fotoj de aviadiloj, gram. diskoj).

Irena Ploskonka — Jaryszow, Szkoła Podstawowa, poczta Zimna Wódka, pow. Strzelce Op., woj. Opole (21-j. instruistino — kun bulgaroj kaj hungaroj pri moderna muziko, nuntempa literaturo, fotoj de aktoroj k. a.).

Anna Sowa — Bycnawa, ul. 22-go Lipca 154, woj. Lublin (18-j. — kun bulgaroj pri turismo, naturo, lit-ro k. a.).

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÁLEV

Redakta komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Venelin MITEV, Stefka ĤRISTOVA, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-88

Mariola Dulbinska — *Zyrardów*, ul. Jaktorowska 133 (18-j. lernantino — kun bulgaraj junuloj).

Krzysztof Osmulski — *Belchatów*, ul. Lipowa 58, woj. Łódzkie (20-j. — kun gejunuloj pri junulara muziko, vivo kaj kutimoj de la popoloj).

Romualda Kurytoriĉ — ul. O. Zielone 4/42, *Sokolka* (mezaĝa tajloristino).

W. Kraskiewicz — *Bydgoszcz* — 2, ul. Kwiatowa 15/7 (14-j. lernanto — pri matematiko, bk).

Irena Dulenba — *Bydgoszcz*, ul. Traugutta 5/1 (24-j. instruistino — pri muziko, turismo, junulara vivo, bk).

Josef Kozłowski — *Gniewkowo*, pow. Inowrocław (52-j. — kolektas alometetikedojn).

Rumanio

Torro Vilmos — str. Zorilor 1, *Covasna* (37-j. dekoranto-pentristo — kun gebulgaroj).

D-ro Rosetel Prodanescu — c. o. p. 5817, *Bukuresti* 61 (46-j. dentkuracisto — pri filatelo).

Sovetunio

Jeremenko Vladimir—314001 *Poltava* 1, str. Kotljarevskaja 21—42 (17 j. lernanto — fotografio, bk).

Indulis Sturis — Lenin 15/52, *Olaine*, Rigas rajons, Latvio (33-j. arkitekto — pri artoj, lingvoj, turismo, sporto, pm, bk, insignoj, suveniroj).

Dovile Rimantaite — Bendroji 12, *Vilnius* 232 040, Litovio (17-j. — kun bulgaraj gejunuloj pri lit-ro, muziko, historio).

Gudaityte Laima—Krantines 10—40, 232 040 *Vilnius*, Litovio, (17-j.—pri literaturo, insignoj, bk).

Elena Egorova — pos. *Novomiĉurinsk*, Rjazanskaja obl., d. 24, kv. 68 (16-j. lernantino — kun ĉl pri ĉt, bk).

Ljuda Barsova — Vavilova 17, kv. 14, 350 039 *Krasnodar* (24-j. studentino — pri esperantaĵoj, libroj, insignoj).

Jurati Vážauskaite — Baisogala 235 125, Radviliškis raj. Bileitno g-vi 15, *Lietuva-Lituanian* (junulo — pri arkitekturo, lingvoj, vojaĝoj, arto, pm, bk, fotoj de aktoroj, sondiskoj, pupoj en naciaj kostumoj, insignoj k. a. — en Esp-to, germana, angla, hispana, rusa).

Julij Muraškovskij — *Ĥarkov* 75, str. Kosicra 18—71 (20-j. studento — kun ĉl pri ĉt, precipe pri distra muziko).

Volodja Jeremenko — *Ĥarkov* 89, str. Vasilij Klĉkov 3 (20-j. studento — kun ĉl pri ĉt, precipe pri distra muziko).

Grigorij Gercikov — *Talgar-2*, str. Komunističeskaja 278, Alma-Atinskaja obl. (50-j. instruisto de matematiko — kun ĉl pri ĉt,

precipe pri E-movado, problemoj de la homaro ka). Li serĉas adresojn ankaŭ por siaj gekursanoj (15—30-jaraj). Skribu al lia adreso!

Vladimir Kasjanĉik — 343 871, *Avdeevka* 3, Doneckaja obl. d. 34, kv. 20 (18-j. — pri kinoarto, estrada muziko, bk, insignoj, gram. diskoj).

Meldra Spirge — *Liepaja*, Bartas 3—3, Latvio (15-j. — kun bulgaraj gejunuloj pri estrada muziko, filmaktoroj, popolkostumoj, turismo k. a.).

Renate Bobina — *Liepaja*, Padomju prosp. 30—5, Latvio (16-j. — kun bulgaraj gejunuloj pri moderna muziko, filmaktoroj, turismo).

Esperanto-rondeto „Tilieto“ en mezlernejo, plej parte knabinoj, dez. kontakti kun bulgaraj gejunuloj. Skribu al ilia gvidanto: Joars Znotinš — *Liepaja*. Karla Marksa 36/38—5, Latvio.

18-jaraj gejunuloj el Talina Sporta Internatlernejo dez. korespondi tutmonde. Ĉiuj interesiĝas pri sporto, moderna muziko, fotoj k. s. Komuna adreso: 200 090 *Tallinn*, P. O. poŝtkesto 170, Estonio, USSR (Do, elektu konkretan nomon! *Junulinoj*: Karin Poom, Eevi Virula — ankaŭ pri malpeza atletiko, Anne Oja — ankaŭ pri alpinismo, lingvoj, Rita Fomina, Malle Järve, Svetlana Bannikova, Onne Levkoi — ankaŭ pri popoldancoj, teatro, Niina Negru, Urve Kuusk—ankaŭ pri desegnado, litro, Helju Kuusk — ankaŭ pri malpeza atletiko, Malle Allikas. *Junnioj*: Olev Paernurk, Madis Maidla, Jaan Pära, Ain Saagim, Ramon Lindal, Peeter Koarmann, Peeter King, Ago Ratus — ankaŭ pri arta manlaboro, magnetofonoj, Allan Elerand).

Julia Rjupina — 272 630 *Izmail*, ul. Lenina 15, kv. 3 (23-j. — kun ĉl pri ĉt).

Eleonora Gruzdeva — 272 630 *Izmail*, ul. Kalinina 35, kv. 4 (45-j. instruistino — kun ĉl pri ĉt en Esperanto, rusa, angla, interŝanĝas anglajn librojn, periodaĵojn, bk).

Ülle Riim — 200 033 *Tallinn*, Tammsaare tee 119-34, Estonio (19-j. abiturientino — kun ĉl pri ĉt; ankaŭ ŝia patrino, nova esperantistino, deziras korespondi).

Nova Esperanto-klaso en mezlernejo serĉas korespondamikojn 15—17 jarajn el ĉl. Skribu al ilia instruisto: Johannes Palu, 200 016 *Tallinn*, poste restante, Estonio. Ankaŭ la E-klaso de progresintoj, 18—19-jaraj gelernantoj, serĉas korespondamikojn (la sama adreso).

20—30-jaraj membroj de E-klubo dez. korespondi kun gesamideanoj el Bulgario. Skribu amase al: Esperanto-Klubo, 454 000 *Ĉeljabinsk*, p. k. 98.

Svedio

Jan Vedevik — Poste Restante, 40 101 *Göteborg 1* (55 j. oficisto — kun ĉl pri ĉt, speciale pri literaturo kaj arto, fotoj, bk).